

WAL

BABELO

N-ro 13, jaro 5

aŭtuno 1998

ISSN 0948-6372

en Hesujo...



Bonvenon
en Hesujo!



...IGIS HELO

Enhavo

Karaj legantoj ...la redaktisto	...3
Miaj francaj impresoj ...Katarina Eckstädt	...4
Igis HELO: Hesa Esperanto-Ligo fondiĝis...Felmano Ulriko	...8
Fajron sentas mi interne (recenzo) ...Katarina Eckstädt	...13
Pri la situacio de la keltaj lingvoj en 1966	...14
De kie oni povas veni? ...Gerhard Kalkhof	...17
Nia lernvortaro (1)	...19
Frankfurtaĵoj ...Felmano Ulriko	...20
SERVAS ...Dennis Wibrow	...22
Nia lernvortaro (2)	...23
Ĝustigo pri la E-historio de Frankfurto ...Wilhelm Barnickel	...24
Lingvaj problemoj	...25

MALBABELO n e eldonas kune Hesa Esperanto-Ligo (HELO) kaj Esperanto-Societo Frankfurto ĉe Majno (ESF), Germanujo. Prezidanto de HELO estas d-ro Ulrich Matthias [Ulriĥ Matias], Ohmstraße 13, 65199 Wiesbaden; retadreso: ulrich.matthias@t-online.de. Prezidanto de ESF estas s-ro Walter Ullmann [Valta Ulman], im Mühlfeld 69a, D-61169 Friedberg; telefono kaj telekopiilo (faksilo): 06031/4617. Redaktisto estas Ulrich Fellmann [Ulriĥ Felman], Homburger Landstraße 168, D-60435 Frankfurt am Main. MALBABELO estas por membroj de HELO kaj ESF senkosta. ISSN 0948-6372

Karaj legantoj,

tiu iom haste produktita kajero prezentas aktualegan okazintaĵon, kiu liveras temon, pri kiu la legantoj certe havas diversajn opiniojn: La fondiĝo de federacilanda sekcio de GEA en Hesujo, nome HELO (Hesa Esperanto-Ligo). En *MALBABELO* 12-a tiu ja estis anoncata, kaj oni invitis al Frankfurto ĉe Majno, en kiu momente ekzistas la plej aktiva movado de Hesujo. Kio dum la fondokunveno okazis estas priparolata jam en ĉi-tiu kajero kaj estos pli detale prezentata en la protokolo, kion ni eble rajtos publikigi en la sekva eldonaĵo de *MALBABELO*. Ĉiukaze la redaktisto - kaj la aliaj subtenantoj de HELO - nun espere atendas la reagojn kaj opiniojn de tiuj esperantistoj el Hesujo, kiuj ne partoprenis la fondokunvenon.

Aldone la redakcio de *MALBABELO* planas produkti germanlingvan, reklaman kajeron ĉ. 16-paĝan kiu titolu: "Esperanto in Hessen". En ĝi aperu ĉiuj kluboj kaj ties adresoj, kunvenlokoj kaj -horoj ktp. Aldone ni enmetos tekstojn pri la historio de Esperanto en Hesujo kaj unupaĝan reklamon pri Esperanto ĝenerale, do la jam sufiĉe konatan prezentadon de la monda lingvoproblemo ktp.

Pro tio mi petas vin: Bv. liveri la aktualajn datumojn kaj datojn al la redaktejo de *MALBABELO* por ke tiu kajero povas esti aktuala, fidinda informilo. Se iu aldone liveros artikoleon pri la respektiva urbo kaj la historio de la tiea klubo aŭ grupo, mi pri tio ĝojegos!

Ĉiukaze oni rajtas diri, ke Ulrich Matthias, kiu estis la ĉefa pelanto al HELO, kaj la aliaj, kiuj venis al la kunveno kaj pretis akcepti la ĉiam ne ŝatatajn postenojn, meritas dankon pro tiu donaco al Hesujo, kiu venis precize antaŭ la kristana kristnaska festo. Ĉu tiu donaco evoluos bone kaj helpos al la disvastigado de Esperanto kaj vigligi la esperantan vivon en Hesujo montros la estonto.

Kaj nun deziras bonan legadon al vi

Felmano Ulriko



Miaj francaj impresoj

Frua mateno montris al ni sian grizan vizaĝon, kiel dum ĉiuj lastaj "someraj" monatoj. Tamen, ni estis bonhumoraj. Ni sciis: ni devos longe vojaĝi, sed tie regas certe vera somero. Krome tie atendas niaj malnovaj amikoj kaj eble ankaŭ novaj. Ni ekveturis direkton UEA kongreso de 1998 en Monpeliero.

Ni trairis la limon, kiu ne plu ekzistas. Ankoraŭ la pejzaĝo estis preskaŭ kiel en suda Germanujo kaj ankoraŭ pluvetis. Ie, inter Mulhuso kaj Dijon ridetis finfine tamen la suno.

Ni venis al Monpeliero jam la jaŭdon antaŭ la kongreso. Tial mi havis sufiĉe da tempo piediri dum vendredo ses horojn tra la malnova urbo. En mia gvidlibro mi trovis la proponon pri promenado tra la urbo. Mi skizis la proponitan vojon kaj ekpiediris. La malnova urbo konsistas nur el malnovaj domoj. La stratoj estas precipe mallarĝaj, tamen en la tuta urbo ekzistas ankaŭ pli larĝaj stratoj kaj ĉarmaj placoj kun multaj, ĉiam bone vizitataj kafejoj. Kelkaj domoj estas renovigindaj. Multaj domoj estas dum la 19-a jarcento konstruitaj, en malvarma stilo de klasikismo. Ĉie troviĝas ankaŭ multaj vendejoj kaj en la centro situas foirejo, kie oni povas aĉeti legomojn kaj fruktojn. Se oni eniras kortojn de la malnovaj domoj, oni malkovras multajn tre belajn ŝtuparojn kaj portalojn. Trairante la malnovan urbon mi trovas triumfarkon, konstruitan de Luis la XIV-an. Ĝi enhavas kvar medalionojn, kiuj montras liajn venkojn kaj neigojn de liaj kontraŭuloj (ankaŭ de protestantoj). Se oni trarigardas la arkon, oni povas vidi la grandan monumenton de la sama reĝo kiel rajtiganto. La monumento kaŭzis multajn malfacilaĵojn. La urbestroj jam en la jaro 1685 volis starigi tiun statuon ekstere de la urbaj muroj. Ili konstruis belan promenejon ĝis la plej alta pinto de la urbo. Tiam tio estis provokado, ĉar tiu promenejo estas sur tiu flanko de la urbo, kie loĝis multaj protestantoj. Sed ĉio fariĝis alie. La monumento estas muldita en Parizo, kaj estis tre malfacile transporti ĝin ĝis Monpeliero. Inter alie la Suna reĝo falis en la riveron Garono. Post multaj jaroj, en la jaro 1718, oni starigis la monumenton.

Al tiu plej alta parto de la urbo akvedukto portas akvon el la montoj. Malgranda akvopalaco situas fine de akvedukto. Oni povas tie tre agrable sidi kaj ripozi.

La urbo posedas tre grandan katedralon. Mi devas konfesi, ke mi ne tre ŝatas tiom grandajn preĝejojn. Ĝi estis interesa por mi nur pro du grandaj eksteraj turoj, kiuj estas portantoj de la granda baldakeno. Mi poste tre ĝuis la plantoĝardenon. Tie estas monumento de la verkisto Rabeleo. Li estis jam kvardekjarulo kiam li komencis la studadon de medicino. Post tri jaroj li iĝis doktoro kaj instruis anatomion ĉe la sama fakultato. La fakultato troviĝas ĝis nun nun en iama monaĥejo apud la katedralo.

Mi devis trairi denove la malnovan urbon, ĉar mia hoteleto estis proksime de hodiaŭa centro. La centro estas Placo de la komedio, kie oni povas sidi en multaj restoracioj kaj kafejoj (kun la plej multekosta kafo!) kaj multaj junaj

homoj, kiuj dancas, kantas, aktoras kaj kolektas la monon. Iu blanke vestita kaj blanke kolorigita nigra junulo staris dum multaj horoj kiel statuo. Mi demandis min, ĉu li ne sentas dolorojn. Se iu metis la monon en lian blanke vestitan sitelon, li por danki faris movojn kiel roboto.

De tiu centro komenciĝas alia promenejo. Ĝi konsistas el kvar vicoj de platanoj, inter kiuj ŝpruciĝas fontanoj. Ĝi ne estas tro longa. Oni trapasas ĝin dum ok minutoj. Fine de tiu bela, romantika promenejo oni konstruis grandegan betonan konstruaĵon, la novan kongresejon. Tie okazis la kongreso.

Iuj aranĝoj okazis en iama kinejo, kiu troviĝas ĉe la promenejo. Por ni tio estis iomete malagraba, ĉar foje oni havis malmunte da tempo inter du prelegoj. Tamen mi opinias, ke tio havis ankaŭ bonajn aspektojn. Ni estis ĉiam sur stratoj de la urbo, kaj ni, esperantistoj, estis videblaj.

La kongreson partoprenis 3133 esperantistoj el 74 landoj. Por mi estas ĉiam la plej bela en kongreso, ke oni povas paroli kun homoj sen vortaro kaj tradukisto.

Dum la kongreso okazis denove Somera universitato. Mi aŭdis kelkajn prelegojn: pri la historio de matematiko kaj matematikistoj, pri la okcitana literaturo, pri la lingvo de Ŝekspiro. La lastan prelegis HumphreyTonkin. Mi konas lin persone, kaj mi jam multe estis ridinta kun li, sed mi ne sciis, ke li estas tiom bona aktoro. Ĉiam, kiam li legis citaĵojn el la dramoj, estis belege. Post tiu prelego, mi decidis denove legi kelkajn dramojn de Ŝekspiro.

Vespere ĉiam okazis artaj aranĝoj. La nacia vespero estis vespero de okcitana muziko. Ĝi estis tre bela. Unu grupo venis jam antaŭ la komenco de la koncerto en la enirejon, kie jam troviĝis multaj esperantistoj. La grupo muzikis kaj du dancistinoj dancis. Kaj tuj estis multaj esperantistoj, kiuj ankaŭ dancis. Kiam la salono estis malfermita, eniris ĉiuj dancante. Post tiu grupo, kantis iu kantisto okcitanajn popolkantojn kaj post li venis tri ciganaj fratoj. Kaj denove okupis la podion grupo da esperantistoj, kiuj dancis bele kaj malpli bele. Plej bele dancis iu kubanino. Ŝi dancis foje kun iu kubano, foje kun iu usonano (tie ne efikas embargo de Usono!)

La teatra vespero estis parte bona, parte ne. Tie montriĝis du monodramoj. Dum la unua parto iu francino rakontis rakontojn kaj fabelojn. Ŝi surhavis tre belajn kostumojn, sed la tuta dramo ne estis dramo, ĝi estis tre monotona kaj daŭris tre longe - unu horon kaj duono! Tio estis tre bedaŭrinda afero, ĉar pro tiom longa, ne interesa parto foriris multaj homoj. Ili ne vidis la bonan parton de la vespero: Vida Jerman el Zagrebo. Ŝi estas profesia aktorino kaj bona esperantistino. Ŝi montris ankaŭ monodramon sed kia kaj kie! Tio estis bonega teksto de Simone de Bovoaro: "La rompita virino". Tie iu virino pripensas sian situacion. Ŝia edzo havas amatinon jam dum jaroj kaj atendas de ŝi, ke ŝi tion akceptas. La dramo estas tre interesa, plena je drameco. Ĝi montras la evoluadon de virino de pacienca edzino al memkonfida virino, kiu scias, kion ŝi deziras - kaj ŝi ne deziras pacienci pri la amatino de sia edzo. Vida Jerman aktoritis tre bone. Mi ne konis ŝin ĝis tiam. Nun ni estas

konatiĝintaj. Ŝi estas tre rezoluta virino, tre parolema, tre interesiganta pri aliaj homoj. Mi staris kun ŝi en la enirejo, kiam al ni venis iu hungaro. Li diris al ŝi, ke li rigardante kaj aŭskultante ŝin preskaŭ opiniis, ke ŝi parolas kun li. Pli bonan komplimenton oni certe ne bezonas.

Ankoraŭ unu teatraĵo estis granda sukceso. Bedaŭrinde, ĝi ne estis montrata en la granda salono, sur granda podio. Teatro de gimnazio el la serba urbo Jagodina, kune kun unu profesia aktoro (ankaŭ esperantisto) montris teatraĵon de sia instruisto de la franca kaj latina lingvoj "La rekviemo por perdintoj". La teatraĵo estis farita en la plej bona tradicio de la absurda teatro de Semjuel Beket. Ili ne sciis, ĉu ili ricevos la vizon, kaj tial ili tute ne estis anoncitaj en la kongreslibro. Ili devis ludi en la festosalono de la urbodomo. Tion sciis tre malmultaj homoj. Sed, kiam oni vidis, kiom bonaj ili estas, oni tuj faris ĉion eblan, ke ili ankoraŭ foje tion montru en la kongresejo. Ili faris tion en iu salono, kie homoj kunportas siajn trinkaĵojn kaj sandviĉojn de la bufedo kaj manĝas. Post la unua frazo de la aktoro "Ĉu vi vidis ie aktorojn?" kaj post la unua kanto kaj danco tuj poste, la manĝado estis forgesita. La teksto estas tre politika kaj kritika. La demando estas, ĉu perdintoj estas ĉiam perdintoj, ĉu venkintoj estas ĉiam venkintoj. Junaj homoj aktoris kun sia tuta juneco, ĝojeco, ĉarmo kaj tamen matureco, kiun ili ricevis en la lando per tiom da politikaj problemoj.

Balo estis kiel ĉiu balo, oni dancis, rakontis, denove konatiĝis kun aliaj esperantistoj. La internacia vespero ne havis nivelon de iamaj. Mi ne scias kial. Oni povis nur unuopajn partojn vere ĝui.

La ekskurso, kiun mi partoprenis estis belega kaj gaja. Mi deziris vidi la Groton de feoj en la montaro Ceveno. Mi konas la groton Postojna en Slovenujo. Tamen tiu en Francujo estas pli granda kaj pli bela. Dum la 19-a jarcento eniris ĝin iu speleologo kaj falis. Lia lampo estis ankoraŭ en ordo sed li ne. Li svenis kaj kiam li denove vekigis, pro la lumo de lampo kaj multaj stalaktitoj kaj stalagmitoj ŝajnis al li, ke feoj dancas.

Post la groto ni vidis la sekan meandron de iu rivero. Kie pratempe estis la rivero, troviĝas nun ĝardenoj. Ni vidis tion de la loko, kiu estas pli ol 300 metrojn super la meandro. Fine ni vizitis iun templaran festaĵon tute konservitan. Ĝi estas interesa, sed la gvidantistino ne estis tre ĉarma. Ŝi opiniis, ke en Esperanton oni ne povas traduki multajn esprimojn. Ĉiam, kiam estis iu mezepoka, nekutima esprimo, ŝi diris: "Nun mi deziras vidi, kiamaniere vi tion tradukos!" Mi aĉetis iun ne tre longan priskribon kaj tra legis ĝin.

Dum la tagmanĝo mi sidis kun la grupo kiu ankaŭ sidis kune en la buso. Tie estis s-ro Lee, koreo, ĝisnuna prezidanto de UEA kaj lia edzino, kaj je unu usonano, finno, nederlandanino, polino, kaj du francinoj. Ni multe ŝercis kaj manĝis bone. Dum la veturado sidis apud mi iu islandano. Mi ne sciis, ke ili ne povas elparoli ĉ,ĝ,ŝ kaj ĵ. Li demandis min: "Kiom AĈA vi estas?" Mi respondis: "Mi povas nur diri al vi, kiom AĜA mi estas. Kiom aĉa mi estas, tion vi povas vidi." S-ro Lee tre ridis poste, kiam mi kun mia islandana

kunveturanto ekzercis la prononcadon. Kun s-ro Lee mi tre bone interparolis. Mi donacis al li kaj lia edzino unu fotoĵon, kiu tre plaĉis al ili. Ĝi estas tre trankvila fotoĵo de spegulataj arboj. Li, kiel ĉiuj azianoj de malproksima Azio opiniis, ke li devas ankaŭ ion donaci la mi. La lastan tagon ni adiaŭis kaj ili donacis la mi korean ventumilon. Mi tre ĝojis pri ĝi.

Post la fino de la kongreso, mi havis ankoraŭ duonon da tago por mi. Mi reveturis dimanĉon. Sabaton vespere mi vizitis iun novan parton de la urbo. Dum la lastaj 15 jaroj ili konstruis tie tute novan parton kiu ne aspektas kiel multaj novaj konstruaĵoj en aliaj urboj. Ili nomas tion klasika moderneco. Tie estas ankaŭ stratoj nomitaj laŭ grekaj lokoj kaj dioj. Se oni rigardas la parton el la aero, oni povas vidi, ke ĝi aspektas kiel iu katedralo. Tie estas unu aleo 1800 metrojn longa kaj dekstre kaj maldekstre de ĝi simetrie konstruaĵoj. En ili estas ankaŭ malgrandaj vendejoj kaj kafejoj. Ĉie oni povas vidi iujn (mi opiniis) betonajn kolonojn. Poste mi vidis, ke tio estas strataj lampoj. En unu parto situas aleo de cipresoj en alia de platanoj. Ĉe la fino de la aleo troviĝas la rivero La Laz. Surflanke de kie oni venas estas restoracioj kaj aliflanke estas granda administraciejo de la regiono. Vespere ĝi aspektas tre bele, ĉar ĝi estas lumigata. Interesa estas tiu urboparto ankaŭ pro tio, ĉar tie estas miksitaj luksaj loĝejoj por la homoj, kiuj povas multe pagi, kaj socialaj loĝejoj por la ne tiom riĉaj homoj. Oni ne deziris konstrui geton. Tio plaĉas al mi.

Ĉar en la kongresejo ne estis bela restoracio, mi deziris manĝi ie bele france. Sed mi ne deziris manĝi sur la Placo de la komedio, ĉar tie estas nur turistoj. Do, mi serĉis restoracion en la nova parto de la urbo. Unue mi trovis la italan. Ne! Mi ne deziris manĝi en Francujo itale. Poste mi trovis la grekan kaj hindan. Finfine mi trovis ankaŭ la francan. Mi ne parolas francan lingvon, sed mi havas iun libreton, kie ĉiuj diversaj manĝaĵoj estas tradukitaj. Mi uzis ĝin. Mi rapide trovis, ke mi deziras manĝi ion el "fruktoj de maro". Nun mi devis serĉi antaŭmanĝaĵon. Mi ne deziris salmon sed mi trovis ion, kio nomiĝis hepataĵa nukso. Mi ne sciis, kio estas tio, sed mi deziris tion gustumi. Mi ricevis tre bele dekoritan teleron kun iomete da salato kaj ronda tranĉaĵo de hepataĵa pasteĉo, ĉirkaŭ unu centimetron dika. Tie estis ankaŭ kaĉo el cepoj. Ĝi estis tre bongusta kaj, kvankam dolĉa, tre bone harmoniis kun hepataĵo.

Por mi kongresoj ĉiam estas la plej belaj travivaĵoj de mia esperanta vivo. Mi ŝatas eblecojn konatiĝi al alilandaj esperantistoj, diskuti kun ili pri iliaj kaj niaj esperantistaj problemoj, ŝerci kun ili kaj esperi, ke mi ilin denove renkontiĝos ĉe venonta kongreso.

Katarina Eckstädt

Iĝis HELO: Hesa Esperanto-Ligo fondiĝis la 29-an de decembro 1998

Post longa vojo fine heliĝis: Dum la 29-a de decembro 1998 kunvenis 16 esperantistoj el Hesujo kaj 2 nehesujaj gastoj en la porjunulara tranoktejo (Haus der Jugend, Deutschherrenufer 12) en Frankfurto ĉemajna por fondi landan asocion por la federacia lando Hesujo (germane: Hessen).

Antaŭ ol simple komenci mian raporteton pri tiu okazintaĵo, iom pri la antaŭa historio. La E-movado en la Germana Imperio ĝis 1933 konsistis ĉefe el lokaj grupoj, kiuj organizis sin sub la tegmento de unu el tri ideologiaj supergrupoj: la laboristoj, la burĝoj kaj la katolikoj. Pro tio sufiĉe ofte unu granda urbo havis plurajn E-grupojn, kiuj inter si ne havis kontaktojn, ekz-e en Frankfurto grupoj de laboristaj esperantistoj (unu de ili fervojista, ĉar la fervojistoj ofte konsistigis apartan grupon kaj havis propran "etoson") kaj burĝaj grupoj (en Höchst, en meza Frankfurto kaj en Bornheim). Katolikaj esperantistoj kiel aparta grupo en Ff-o, kie loĝis simile grandaj grupoj de tiuj ĉefaj religioj, ŝajne ne ekzistis. Iam oni aldone starigis "ligojn", kiuj celis al kunlaboro de E-klubo kaj grupoj el ne tro foraj lokoj. Tiuj ne sekvis la limojn de la politikaj teritorioj. Frankfurto ĉe Majno apartenis al la areo de SOL (Sudokcidenta Esperanto-Ligo).

Kiam post la dua mondmilito en Germanujo revigliĝis la esperanta movado en lokaj grupoj, oni ne ĉie restarigis la sufiĉe grandajn E-ligojn de la antaŭnazitempa periodo. Tio povis havi diversajn kaŭzojn. Mi povas imagi, ke la tiamaj okupantoj, kiuj regulis la vivon kaj malhelpis liberan vojaĝadon trans la limoj de la militistaj areoj ("Besatzungszonen") kune kun la detruitaj trafikrimedoj kaj la malriĉeco de la homoj preskaŭ malebligis la kontakton inter tro foraj urboj. Ĉiukaze, la iamaj regionegaj ligoj ne samforme reestiĝis. En suda Hesujo formiĝis RoMoLo (Rejn-Majna Esperanto-Ligo), kies historio estas ankoraŭ skribota. Al ĝi aliĝis kluboj de suda Hesujo kaj orienta Rejnland-Palatinato, poste ankaŭ meza Hesujo (ekz-e Vetslaro, Gisenjo), norda Baden-Virtembergo (Hajdelbergo) kaj okcidenta Bavarujo (Aŝafenburgjo). Oni havis historiajn, lingvajn kaj geografiajn rilatojn kaj dum la sesdekaj jaroj ligiĝis per sistemo de rapidaj urbligantaj trajnoj ("S-Bahn"), kies centro estis (kaj estas) Frankfurto ĉe Majno.

Bedaŭrinde, la aferoj de RoMoLo iam pli kaj pli malboniĝis. Unu kaŭzo eble estis, ke malaperis pli kaj pli de la dum la sesdekaj jaroj ekzistintaj E-grupoj, el kiuj hodiaŭ ne eĉ restas triono. Tamen restis aktivaĵoj de RoMoLo, oni regule invitis la membrojn kaj okazigis kunvenojn de la membraj grupoj kaj kluboj. Jen venis nova evoluo: pli kaj pli oni en Germanujo establis asociojn, kiuj sekvis la federacilandajn limojn anstataŭ ol historie kreskintaj ligoj. Pro tio unue la grupoj el norda Baden-Virtembergo kaj Bavarujo ne plu partoprenis en RoMoLo, ĉar fondiĝis

Bavara kaj Baden-Virtemberga Esperanto-Ligoj. La urboj Manhajmo kaj Hajdelbergo el norda Baden-Virtembergo aldone estis en la areo de E-Ligo "Kurpfalz". Germana Esperanto-Asocio forte subtenis tiun evoluon: Oni postulis, ke estiĝu pure laŭfederacilandaj ligoj kaj estiĝu ĉiuj aliaj, kiuj kontraŭstaras tiun celon. Pli kaj pli tiu celo realiĝis. Post kiam oni en Majenco, la regurbo de Rejnland-Palatinato, estis fondinta la respektivan landan ligan, restis nur Bremeno kaj Hesujo sen landa asocio. Por mi tiu laŭfederacilanda ideo faris la impreson de iu sen raciaj kaŭzoj fiksita ideo, iel ideologia, ĉar la "landoj" de Germanujo ja estas sufiĉe malsame grandaj. Bremeno kaj Hamburgo estas ja nur urboj kun la statuso de lando: Starigi "landan" ligan estas pura formalismo. Kontrastas landoj kiel Bavarujo, kie la distancoj inter la kluboj estas tiom grandaj, ke oni ne povas viziti kunvenon dum unu tago inkluzive al- kaj reveturo. Tiel estiĝis, ke la klubanoj el Aŝafenburgo, kiuj per trajno povis facile viziti RoMoLo-kunsidon sen disponi pri pli ol unu tago, nun devas veturi ĝis Munĥeno aŭ aliaj foraj lokoj kaj devas investi almenaŭ semajnfino.

Tamen, ankaŭ RoMoLo mem ne sufiĉe forte sin defendis, kaj bedaŭrinde estis tiel, ke la agado de RoMoLo dum la lastaj jaroj estis pli kaj pli povra, malaloga kaj senenergia. Pro tio kaj personaj kvereloj, iuj membroj de RoMoLo ripete proponis la malstarigon de ĝi kaj proponis fondi hesan asocion, kiel ankaŭ GEA proponis. Tiu ne facile povis okazi: RoMoLo - aŭ ties lasta granda defendinto, s-ro Bösche - ne volis rezigni pri tiu afero kaj longe malakceptis eĉ diskuti tiujn proponojn. Ĉe la alia flanko estis tiel, ke oni ne trovis subtenantojn por hesuja asocio, nome HELO (Hesa Esperanto-Ligo), kiel oni jam antaŭ ĝia estiĝo ĝin nomis. Jam en *MALBABELO* 3-a mi proponis *MALBABELO* n kiel ligilo por tuta Hesujo (la sekvojn vi povas legi en la sekvantaj numeroj: oni volonte senkoste akceptis la gazeton, sed poste nur ses personoj el ĉ. 100 ne-Frankfurtanoj abonis ĝin), kaj en la kajeroj 6-a kaj 7-a de 1996 mi la unuan fojon petis pri opinioj pri HELO. La (malmultaj) reagoj estis plejparte malfavoraj, sed ke 95% de la legantoj tute ne reagis indikis pli klare, ke tiam ne ekzistis sufiĉe da intereso pri tio. Dum la sama tempo, la prezidanto de ESF, s-ro Ullmann, vizitis du hesajn klubojn. Ankaŭ tie oni ne interesiĝis multe pri HELO. Eble oni timis, ke iu postulus laboron de oni, eble oni estis sufiĉe kontenta pri la situacio rilate al Esperanto; ĉiukaze neniu kredis, ke tuthesa asocio helpus. Ankaŭ la provo de la redaktisto, skribi pli pri aliurbaj okazintaĵoj (vd. en MB 8 la raportoj pri Giseno kaj Marburgo), ne instigis iun de tiuj lokoj skribi artikolojn por *MALBABELO* aŭ serĉi kunlaboron. Ne estis tiel, ke oni indikis, ke ne bezonatas kunlaboro aŭ helpo. Regis simple plejparte senreageco.

Samtempe ja floradis problemoj, kiujn mi ne denove volas detale priskribi, sed nur koncize mencii: Pli kaj pli iamaj Esperanto-kluboj estiĝas; inter la restantaj kluboj kaj grupoj pli kaj pli ne plu regule kunvenas; novaj

metodoj allogi novicojn ne ekestas; la publiko malpli kaj malpli ofte aŭdas pri Esperanto; ktp. ktp. (detale legu pri tio ekz-e en *MALBABELO* 6-a, p. 28-35). En Frankfurto ni dum la 90-aj jaroj sukcesis inversigi tiun evoluon: Hodiaŭ ni havas pli da membroj, pli da aktivaĵoj kaj pli da komencantoj ol antaŭ kvar, ses aŭ ok jaroj. Tiu akre kontrastas al tiu, ke intertempe en Hesujo denove malaperis grupo (Ofenbaño) kaj estas aliaj grupoj, kiuj atingis plian gradon de malĉeesto, ekz-e ne plu regule kunvenas (Visbado) aŭ pro manko da homoj jam preskaŭ ekzistis (Ruselshajmo).

Kion fari? Ĉu ion fari? Ĉu la nereagintoj al la demando pri kunlaboro ne interesiĝis, timis laborpostulon aŭ simple letargiis?

Oni ne forgesu, ke neniam ekzistis esperantaj rilatoj inter norda kaj suda Hesujo. En la geografia mezo ekzistas intertempe nur plu unu urbo kun aktivaj esperantistoj, kiuj tamen ne havas regulitan kluban vivon, nome la urbo Marburgo. La cetero de la grupoj ekzistas aŭ en la sudo aŭ en la nordo - jen du areoj sen ponto inter si, se Marburgo ne reagus. Kaj ĝi ne reagis. Por mi, Marburgo estis la ideala ejo por renkont(iĝ)i kaj fondi HELon. Tamen, el tiuj faktoj por mi persone evidentiĝis, ke RoMoLo teorie estis la plej bona solvo. Sed la evoluo malpravigis RoMoLon (kun iom da forto pere de GEA-aj ideologoj).

Ĉirkaŭ antaŭ unu jaro *Ulrich Matthias*, kiu estis transloĝiginta de Hajdelbergo al Visbado, la regurbo de Hesujo, decidis fondi HELon, se nur estus subtenantoj. Ĉar ni jam antaŭe estis diskutintaj tiun temon, ni, kelkaj aktivaj esperantistoj el Frankfurto, kiuj ĉiusemajne kunvenas en kafejo Albatroso (aldone al la prelegaj kunvenoj en *Haus Dornbusch*), decidis subteni tiun. Ni des pli estis konvinkitaj, ĉar oni diris al ni, ke ni ja - kiel ĉiu alia landa asocio - havos la rajton ricevi monon de GEA, parton de tiu mono, kiun ni fakte mem pagis al GEA kaj kion GEA donas al la landaj asocioj, sed kiun ĝi detenas de nelandaj asocioj. De tiu mono ni povas almenaŭ financi *MALBABELO* n por ĉiuj hesaj membroj de GEA... Ulriko M. do skribis la invitan tekston kaj produktis statutaran proponon surbaze de la statutoj de BAVELO (Baden-Virtembergga Esperanto-Ligo). La inviton ni publikigis en *MALBABELO* 12-a, sufiĉe frue antaŭ la planita fondodato. Nia timo nur estis, ke la afero iĝos preskaŭ pure Frankfurta afero...

Al tiu helpis, ke ni kunvenis en Frankfurto. Tio tamen estis verŝajne saĝa. Kunvenante en Marburgo, verŝajne nur duono de la "Frankfurtanoj" (pli precize ESF-anoj), kiuj vizitis la fondokunvenon en Frankfurto (13), estus vizitintaj la kunvenon en Marburgo. Tamen, oni ne sciis, ĉu iu Kaselano aŭ Marburgano estus vizitinta kunvenon okazanta en Marburgo. Reagojn ni ja tute ne havis. Pro tio nun iom pri la fondokunveno mem. Pli detala oni povos legi pri ĉio en la protokolo.

Jen la kunveno:

Kunvenis ni dimanĉe je la 16-a horo (4-a posttagmeze) en *Haus der Jugend* ĉe la rivero Majno je la Saksenhaŭsa flanko de ĝi (kiu ebligis al ni postan vizitadon de tieaj pomvinaj trinkejoj). Entute ĉeestis 18 personoj, el tiuj 2 nehesaj gastoj (Ursula Niesert de GEA kaj Rudolf Büsche, la iama prezidanto de la intertempe malfondita RoMoLo, kiu ja loĝas en Majenco, Rejnland-Palatinato, sed najbara urbo al Visbado, kio sufiĉe bone montras, kiel sensenca estas la ordonita splitiĝo al du landaj asocioj). La aliaj 16 hesaj esperantistoj, samtempe GEA-membroj kaj pro tio aŭtomate membroj de la landa filio de GEA, nome fondota HELO, estis plejparte el Frankfurto. Inter ili estis nur tri eksterfrankfurtanoj: *Ricard Wilshusen*, kiu prezentis Darmŝtadon sude de Frankfurto, *Peter Roether* el Miĥelŝtado, oriente de Frankfurto, kaj Rudigro Sakso el Eŝvego, la sola nordheso en la rondo. Ĉiuj aliaj estis el la centra aŭ orienta Rejn-Majna areo kaj membroj en ESF (Esperanto-Societo Frankfurto), inter ili preskaŭ la kompleta ESF-a estraro (mankis la kasisto, s-ro Rabenstein).

La tagordo prezentis la punktojn malfermo, elekto de la kunvena gvidanto kaj de la protokolanto, decido pri la akcepto de la tagordo, diskutado pri la statutararo, voĉdonado pri ĝia akcepto, elekto de la estraro, planado de la laboro kaj "diversaĵoj".

Malfermis la kunsidon Ulrich Matthias, kiu tuj poste ankaŭ **elektiĝis kiel gvidanto**, kion li bone faris (tamen devis nin post du horoj - je la 18-a horo - forlasi kaj estis anstataŭota de Reinhard Pflüger). **Protokolanto** iĝis Felmano Ulriko. Oni parolis laŭplaĉe Esperanton kaj la germanan lingvon miksite kaj senprobleme (kvankam mi foje havis la impreson, ke el tiuj, kiuj daŭre parolis la germanan, kelkaj diskutis la aferon tiel, ke evidente ne tute kongruis al kio oni ĝuste antaŭe estis dirita en Esperanto).

La **tagordon** oni sendispute akceptis kaj tuj ekparolis pri la **statutar**-proponon, kiun *Ulrich Matthias* estis verkinta laŭ la BAVELA, kun kelkaj alĝustigoj. Tiu iĝis la plej longe daŭra punkto, tamen espereble unu, kiun oni estonte ne ofte devas plu diskuti. Indis ja havi taŭgajn statutojn, kiujn neniu poste volas ŝanĝi pro logikaj, enhavaj, leĝaj aŭ ortografiaj eraroj.

Unue oni diskutis pri la nomo de la fondotaĵo. Tiu nun estos en la germana versio „**Deutscher Esperanto-Bund, Landesverband Hessen**“, en la esperanta simple „**Hesa Esperanto-Ligo**“ (ml. HELO). Oficiala sidloko de HELO estas la adreso de la landa prezidanto, do Visbado (la adreson vd. malsupren sub „**1) Oficialaj estroj**“). Kiel landa sekcio de GEA, ĉiu membro de GEA kaj GEJ kun loĝloko en Hesujo aŭtomate estas membro de HELO kaj estonte denove ricevos MALBABELOn (kion ni jam faris kvarfoje dum 1996/97, sed poste nur sendis kajerojn al pagantaj

abonantoj). HELO kiel landa sekcio ricevos sian parton de la membrokotoj de GEA, kiel jam estas rilate al la aliaj landaj sekcioj de GEA.

Ĉar prepariĝos ankaŭ alia artikolo pri tiu temo, kiu aperos i.a. en esperanto aktuell, mi ĉi tie prezentas nur tri punktojn el la kunveno:

1) Oficialaj estroj: La diversajn postenojn, kiujn societo ja havu, akiris la sekvaj personoj:

landa prezidanto: **Ulrich Matthias**, Wiesbaden, membro de la tiea E-grupo (Ohmstraße 13, 65199 Wiesbaden, tel. 0611 / 466712, retadreso: ulrich.matthias@t-online.de);

vicprezidanto: **Ulrich Fellmann**, Frankfurt a.M., membro de la tiea E-grupo (ESF), (Homburger Landstraße 168, 60435 Ffm, telefono & telekopiilo: 069 / 542716);

trezoristo: **Reinhard Pflüger**, Frankfurt a.M., membro de ESF (Hermannstraße 3, 60318 Ffm, tel. 069 / 5978 467, retadreso: reinhard.pflueger@esperanto.de);

konsilantoj: **Rüdiger Sachs**, Eschwege, membro de la tiea E-grupo (Ernst-Metz-Straße 3, 37269 Eschwege, telefono 05651 / 50560);

Katarina Eckstädt, Bruchköbel (apud Hanau), membro de ESF (Geschwister-Scholl-Straße 1, 63486 Hanau-Bruchköbel, tel. 06181 / 763 43);

Ricard Wilshusen, Darmstadt, membro de la tiea E-grupo (Beckerstraße 26, 64289 Darmstadt, telefono 06151 / 799 00);

Ludwig-Rudolph Welther, Offenbach, membro de ESF (Herm. Steinhäuser 4, 63065 Offenbach, telefono 069 / 882249);

kasreviziantoj: **Jutta Buß**, Schwalbach i.Ts., membro de ESF,
Ekkehardt Beyer, Friedrichsdorf, membro de ESF.

La diskutado preskaŭ ĉiam okazis en granda harmonio kaj la du gvidantoj bone gvidis la kunvenon. Kio sekvos el la tuta afero, ni ja vidos.

2) Arĥivo por HELO / aktoj de RoMoLo:

La aktojn de RoMoLo s-ro Ŝponar, la lasta (eks-)vicprezidanto de tiu regiona asocio, donis en la manojn de HELO. Ĉar HELO ne jam havas arĥivon, tio efektiviĝis tiel, ke praktike li donis la aktojn al la biblioteko de Esperanto-Societo Frankfurto (ESF) pere de ties prezidanto, s-ro Ullmann,

kaj informis pri tiu fakto la vicprezidanton de HELO, s-ron Ulrich Fellmann. Tiuj aktoj ŝajnas al mi sufiĉe interesaj, ĉar mi jam delonge emas esplori la historion de RoMoLo, kiu ĝis nun ne estas dokumentita en gazetoj aŭ libroj. La iamaj aktivuloj de RoMoLo, kiujn mi demandis pri kunlaboro en tiu punkto, ĉiuj rifuzis. Sekve, la aktoj konsistigas veran trezoron, la solan fonton por skribi la historion de la Esperanto-movado en la regiono.

3) Planoj por estonta agado: Oni interkonsentis, ke indas starigi kontaktojn inter la diversaj grupoj de Hesujo, uzi *MALBABELO* kiel komuna organo, reklami pli multe pri Esperanto kaj instigi ĉiujn membrojn al kunlaboro.

Oni decidis, ke la estraranoj jam du tagojn poste, marde, la 1-an de decembro, kunvenu por ekdetaligi tiujn aferojn. Tio jam okazis, ĉiu estrarano escepte de la prezidanto, kiu ne havis tempon, partoprenis kaj diskutis la aferon. Oni tie decidis almenaŭ sendi al la gazetoj de la regiono noton pri la fondiĝo de HELO (i.a. al Darmstädter Echo, FAZ, FRAU, Frankfurter Neue Presse, Offenbach Post k.a.) kaj ankaŭ estonte regule liveri notojn pri la esperanta vivo en Hesujo.

Pliajn informojn pri HELO vi legos en estontaj numeroj *MALBABELO*. La estraro petas pri via opinio!

Felmano Ulriko

(Recenzo:) Ulrich Matthias: Fajron sentas mi interne

La libro aperis en la jaro 1990 kaj de ĉi tiu jaro ĝi troviĝas en la Baza listo de la originala Esperanta literaturo farita de W. Auld.

Pri Ulrich Matthias mi ne povas multe diri, ĉar mi nur scias, ke li estas matematikisto, kaj ke li vivas kaj laboras en Wiesbaden. Mi rimarkis ankaŭ, ke li estas retirita homo, almenaŭ se li estas kun homoj, kiujn li ne bone konas.

La malgranda romano estas en "mi-formo" skribita. Ĝi estas rakonto pri junulo, kiu iĝos dum la rakonto juna viro. Deksesjaraĝa Manfred estas gimnaziano, tre inteligenta kaj bona lernanto. Li lernas tre volonte, sed li estas ĉe siaj kunlernantoj konata kiel ambiciulo, kaj tial li estas ĉiam sola. Ankaŭ hejme li estas iu, kiu ne tute apartenas al la familio. Lia patrino amas lin, sed ŝi ne estas sufiĉe forta kontraŭstari al la patro, kiu deziras nur ĉiam

fari "tutajn virojn" de siaj filoj. Li ne estas karesema patro, ĉar tio ne apartenas al la bildo de "vera viro" kaj tial estas por li ankaŭ tre kompreneble ke li batas la filon, ĉar li deziras nur ĉion bonan por li. Li eĉ ne parolas kun la filo. La adoleskulo ne havas amikojn kaj ne amikinon kvankam la kunlernantino Marina plaĉas al li. Li ne estas sufiĉe kuraĝa alparoli ŝin, kaj tial dum ferioj li skribas al ŝi. Dum la tuta rakonto uzas Manfred leterojn kiel ilo por esprimi siajn emociojn. Tiuj leteroj estas ĉiam tre seriozaj kaj ankaŭ tre malfermitaj. Per ili li povas diri tion kion li preskaŭ neniam povas diri buŝe. Li parolas pri siaj malfacilaĵoj alparoli aliajn homojn, pri tio ke li estas ĉiam sola, ke li deziras esti amiko de siaj gelernantoj. Ankaŭ post unu artikolo en la gazeto de la lernejo, kiun li nomas "Inter aliuloj", li ne ricevas reagojn de kunlernantoj. Li aŭdas nur kelkajn, preskaŭ hazardajn rimarkojn de kiuj la plej grava estas tiu de Martina. Sed ĝi ne estas tia kian li deziras. Ŝi opinias, ke li kondamnas junajn homojn, ĉar ili interesiĝas pri motorcikloj, sporto ktp., kaj ke li devas serĉi ĉe si mem la kulpon, ne ĉe aliaj homoj. Tio estas fino de unua amo. La tempo pasas, li lernas kaj fantazias pri diversaj junulinoj ĉar li estas ankoraŭ ĉiam sola. Li finas la gimnazion kaj studas matematikon. Sed ankaŭ tie li ne ricevas kontakton al aliaj gestudentoj. Li partoprenas kunvenoj de katolika studenta societo kaj iam li partoprenas ankaŭ German-Franca Junulara Renkontiĝo en Ludwigsburg kie li renkontas esperantistojn. Li aĉetas lernolibron kaj post unu jaro li parolas la lingvon tute flue. Li partoprenas diversajn junularajn aranĝojn, konatiĝas kun junaj homoj el diversaj landoj. Sed li ĉiam serĉas knabinon por si. Diversaj plaĉas al li, li ridetas, kiam li ilin vidas, li ĝuas la kisetajn kiujn li ricevas ĉe revidoj kun junulinoj sed li rimarkas ke ili havas alian mentalecon, li estas alia. Iam li konatiĝas kun iu polino Beate. Ŝi lernas ankaŭ tre rapide Esperanton kaj dum iu junulara renkontiĝo li diras al ŝi (tre komplike), ke li ŝin amas. Ŝi amas ankaŭ lin kaj tamen li ne povas paroli spontane kun ŝi. Li skribas al ŝi denove leteron. Subite ŝi diras al li, ke ŝi havas amaton en Polujo.. Tio estas la sola afero, kiu ne plaĉas al mi. Ne, ke ŝi havas amikon, sed ĉar ŝia eldiro, ke ŝi amas lin kaj poste, ke ŝi havas amikon, ne estas, laŭ mia opinio, sufiĉe klarigita.

Denove li partoprenas iun renkontiĝon kaj denove li estas sola. Neniu rimarkas el la grupo, ke li mankas. Li tamen memoras la frazon de Beate "la mondo estas plena je ĝojo, ni nur ne rimarkas ĝin."

La libro tre plaĉis al mi. La pensoj de la junulo estas bone priskribitaj, oni povas kompreni liajn malfacilaĵojn. Oni rimarkas, ke verŝajne la plej granda parto de la rakonto estas aŭtobiografia sed ĉio estas eĉ ekscita. Kiam oni legas la libron, oni deziras scii, kio okazos kun la junulo.

La lingvo estas ne komplika kaj facile komprenebla.

Katarina Eckstädt

Internaciaj notaĵoj pri la monda lingvoproblemo: Tekstoj el la gazeto "International Language Review" en 1966 pri la keltaj lingvoj

La sekvaj informoj troviĝis en kajero de la priplanlingva gazeto "International Language Review" (ILR) de la jaro 1966 (vol. XIII, n-ro 44-45). La originalaĵoj aperis anglalingve. Sur la paĝoj 37 - 38, ĝi raportas pri la keltaj lingvoj.

La **irlandgaela** estas la sola kelta lingvo kiu gajnis nacian statuson en la moderna tempo. Laŭ dokumento publikigita de la administracio de Respubliko de Irlando estas tiel: la nacia celo estas la restarigo de la irlandgaela lingvo kiel ĝenerala ilo por komunikado (laŭ Komisiono pri Restarigo de la Irlandgaela Lingvo, Dublino, 1964).

Aktuale, la irlandgaela estas oficiala apud la angla en ĉiuj publikaj aferoj de la Respubliko. Laŭ la nombrado de 1961, pli ol duono de miliono da irlandanoj asertas, ke ili parolas la irlandgaelan, sed al la plimultularo de tiu grupo ĝi estas akirita lingvo, kaj la nombro de fluaj parolantoj aktuale estas verŝajne malpli ol kvarono de miliono.

[N.d.l.r.: malgraŭ forta subteno fare de la administracio, oni povas legi en multaj verkoj, ke la disvastigo de la irlandgaela plejparte fiaskis (laŭ pli novaj informoj). La eldonkvanto de libroj en la irlandgaela en la Respubliko Irlando estas hodiaŭ eĉ malpli alta ol en la brita provinco Ulster/Nordirlando]

La **skota lingvo** havas ĉirkaŭ 75.000 gepatrajn parolantojn en Skotlando, ĉefe en la Hebridoj, kaj aldone 7000 en Nova Scotia [en Nordameriko]. Ĉar la lingvo ne havas oficialan statuson kaj estas rare uzata en la eduka sistemo, la nombro de negepatraj parolantoj estas en eĉ la areoj, kie ĝi estas uzata, malatendebila.

La **manksa** estis parolata sur la Isle of Man [ajl of men] [insulo inter Britujo kaj Irlando] kaj estas unu de la plej junaj "mortaj" lingvoj en la mondo! Je la fino de la dua mondmilito restis 20 gepatraj parolantoj. En 1950, la nombro estis falinta al 10. En 1960, nur tri de ili restis, sed kvara homo estis elmigrita al Kanado. Nuntempe ĉiuj kvar estas forpasintaj, kvankam ekzistas ankoraŭ kelkaj centoj da entuziasmuloj, kiuj lernis la lingvon en la aĝo de plenkreskuloj [...].

La **kimra lingvo** (angle: Welsh, kimre: Cymraeg) estas parolata de ĉirkaŭ 650.000 homoj, pli-malpli triono de la enloĝantaro de Kimrujo [Wales/Cymru]. Ĝi ricevis sufiĉe grandan kvanton de oficiala subteno, la gajno de kelkaj pozicioj en publika oficejoj postulas sciojn de ĝi, kaj estas

certa kvanto de libervola instruado de la kimra en ĉiuj lernejoj en la regionoj de Kimrujo.

[N.d.l.r.: la nombro de fluaj parolantoj falis al ĉirkaŭ 400.000 en 1985].

La **bretona lingvo** (bretone: Breiz / Brezhoneg) estas hodiaŭ la plej ofte parolata kelta lingvo (900.000 gepatraj parolantoj), kaj samtempe, paradokse, estas la sola lingvo kiu aktuale estas persekutata kaj subpremata fare de la administracio de la lando en kiu ĝi estas parolata. La franca administracio permesas malmulte aŭ neniun bretonan instruadon en la nacia lernejoj. Bretonaj publikaĵoj estis kelkfoje malpermesataj, kaj fakte, eĉ bretonaj personaj nomoj estas kontraŭleĝaj! Tamen, malgraŭ ĉio, la lingvo ankoraŭ floradas.

[N.d.l.r.: mi ankaŭ iam legis aliloke, ĉirkaŭ en la 80-aj jaroj, ke bretono ne rajtas edziĝi sen havi francan nomon. Tiam mi dubis pri tio ĉar mi ne povis imagi similan en okcidenteŭropa lando. Verŝajne mi estis tro naiva. La subpremon de la elsasa mi ĉiam klarigis al mi mem per la fakto, ke temas precipe pri germana lingvo, kaj post la dua mondmilito mi povis kompreni la malamon de la francoj, kvankam ja temas pri siaj propraj civitanoj. Ankaŭ ŝokis min artikolo pri la subpremo de la friza en Nederlando, lando, kio estas estimata kiel tre libereca lando eĉ kompare al la hodiaŭa Germanujo, kie la minoritataj danoj kaj sorboj havas la rajton uzi sian lingvon en lernejo, surstrate ktp. Mi interesiĝus en tio, ĉu ankoraŭ hodiaŭ la leĝa situacio de la bretona estas tiom malfavora. Laŭ la nombroj legeblaj en diversaj publikaĵoj, la nombro de la parolantoj ŝajne malkreskis iomete al inter 650.000 kaj 800.000].

La **korna lingvo** (angle Cornish) estas alia kelta lingvo, kiu travivis nur ĝis antaŭnelonga tempo, [...] kaj certa kvanto da literaturo en tiu lingvo travivis, plej menciinda mezepokaj misteriaj ludoj. La korna estis en komuna uzo en la duklando ĝis la Tudor-a tempo kaj parolata en ĉiuj kirkoj en Cornwall ĝis 1678. Ĝi preskaŭ ekstermiĝis dum la 18-a jarcento; estas ofte dirata, ke Dolly Penreuth, kiu mortis en 1777, estis la lasta parolanto de la korna. Tamen, estas hodiaŭ konata, ke estis kelkaj post ŝi, inkluzive John Davy de Zenor, kiu mortis en 1891. Komence de la nuna jarcento estis establita la "Federation of Old Cornwall" kaj provoj revivigi la kornan komencis per la presado de instrulibro kaj vortaroj fare de entuziasmuloj. En la ĉefurbo de Cornwall, Truro, okazas nun ĉi-somera lernado pri la korna lingvo, kaj kunvenoj de bardaj Gorsedd estas regule faritaj.

Esperantigis kaj mallongigis *Felmano Ulriko*

De kie oni povas veni ?

Antaŭ kelke da tempo laŭokaze de seminario mi vojaĝis kune kun samideano en taksio - do por atingi nian komunan seminarian kulturdomon - interbabilante, sed ne tro diskutante. Ni parolis pri la plej diversaj aferoj, do vetero, manĝaĵo, vestaĵo, piedkaloj, kombiloj, kaj - tio ne estas forgesenda! - pri Esperanto. Preskaŭ atinginte nian celon por elaŭtiĝi, mi demandis lin, de kie li venas. Abrupte, ridetante kaj iom pripenseme li responde diris: "Mi venas el la vera Vietnamio!"

Tio ŝokis min, vere! Sed tempon por pripenso aŭ eĉ cerbumado mi malhavis, ĉar la alveno al la seminariejo, salutvortoj, akcepto ktp. malhelpis ĉian logikan aŭ sofistikan ideojn. Provizore mi forgesis jenan strangan incidenton; pli gravaj ideoj pri Esperanto tro okupis min.

Tiam ni vespermanĝis. Apud mi al la tablo sidis samideanoj el la plej diversaj landoj. Kompreneble unu la alian demandis pri sia loĝ- resp. nacilando. Do, unu estis litovo, alia skoto, tria norvego, kvara egipto, kvina - ho, miraklo! - vietnamo. Tion eksciante mi estis trafita ĵus kiel de siliko aŭ de fromaĝo, kiel oni pensas pri tio, ĉar nun la evento de la taksio revigliĝis.

Lin - do, la vietnamon - mi demandis: "Ĉu vi venas el la vera Vietnamio?" Kaj mi ne miris, kiam li paliĝis, perpleksiĝis kaj eĉ ŝvitis. Sed neniu vorto venis el trans liaj lipoj. Sole la aliaj samtablanoj indignis. La egipto preskaŭ insultis, dirante: "Kiel vi povas pretendi tion! Ĉu li aspektas kiel simio? Mi ne toleras, ke vi ofendas lin!" La litovo sekvis, iom pli milde: "Vi ne rajtas, aflikti nian azian kolegon. Li estas senkulpa pri sia flava haŭto. Tamen li ne mensogas, eĉ ne kiam li estas ĵetata de ĉerizkerno anstataŭ de tomato!" La norvego karesis lin, do la vietnamon, dirante al mi, ke tiu brava viro faris dum la pasinta kongreso referaĵon pri la piedkaloj de sia maljuna bopatro, kaj pro tio neniam prezentus malveron aŭ malpravon. Sole la skoto konsentis je mia malaprobo, dirante: "Jes, vi pravas, ĉar verŝajne li kaŝas monerojn en liaj jakopoŝoj anstataŭ meti ilin sub sia ĉapo, kiel mi ĝenerale agas!"

Kaj nun laŭvice ŝvitis mi, tute pale, tute perplekse. Evidente mi devis pravigi min pri tia kvazaŭa misagado; sed kiel? Tio estis embarasa afero, vere aferaĉo! Gratante unue mian hararverton, poste mian liphararon neekzistantan, mi pripensis kaj pripensis.

Tiam ... kvazaŭ signo de ĉielo aŭ samsignifa fulmo ... aperis - preskaŭ nekredeble! - mia eltaksia kunveturinto. Subite li staris sub la pordo, liaj okuloj serĉis sidlokon kompreneble ne por si mem sed por la korpo de sia posedanto. Min vidi, alproksimiĝi ĉi tien, tio daŭris ne pli longe ol fingroklako. Ridetante li ekstaris apud mi, seĝo por eksidado ne ekzistis kaj ne estis ekhavebla; tial li do staris. Senĝene li okulumis de unu al alia, dum mi komencis mian defendadon: "Mi tre bedaŭras mian kontraŭparoladon aŭ - tion mi pli rigore bedaŭras - mian pretendon pri nia kara samideano.

Estas ekster mia lango, kraĉesprimi ian ajn esperantistan samtablanon, precipe mian karan najbaron."

Mi interrompiĝis karesrigarde okulumi mian vietnaman najbaron, kies ŝviteroj estis foririntaj, kaj kiu trankviliĝis ree, verŝajne influate aŭ de la novulo aŭ de sia budhista doktrino. Fajna ridetado, superlumanta liajn trajtojn, evidentigis ke li agordis je mia suspektema pretendo pri lia vera vietnameco. Sed la aliaj diversnaciaj samtablanoj agacis min.

Distingiĝis el ĉiuj la skoto, kvankam konsentante kun mi. Certe li povis pozi kiel savonta anĝelo, sed ĉion li disbatis per la vortoj: "Mi aŭdas ĉiam vera ... vera ... vera! Kio aŭ kiu estas vera?" Kaj sin turnante al la novulo li tiun fajfumis: "Mi vetas, ke vi ankaŭ venas el ia vera lando, ĉu ne?" - "Kompreneble", fiere resonis la kvazaŭa vietnama voĉo. "Ĉar ja ekzistas landoj ne veraj. Sed mi estas feliĉulo -", ekŝvelis lia brusto pufiĝanta, "ke mi venas el ve-e-e-era lando!" Plilongigante la vorton ,vera' entuziasmetone li ekstaziĝis, kvazaŭ li fariĝus aliplanedano aŭ jam eĉ estus tia. Ĉiu al la tablorondo perpleksiĝis, paliĝis kaj ŝvitis.

Fine la egipto ekkuraĝiĝis dirante: "Kiam vi pravas - kaj neniu al nia tablorondo dubas pri tio, ke via lando estas vera - bonvolu respondi kelkajn demandojn, farotajn de ni; ĉu vi konsentas?" - "Kun la plej granda plezuro", li resonigis sian voĉon entuziasme, kun larĝe etendataj brakoj.

Do, mi ĵus ekpensis: "Neniam mi povis imagi veran vietnamon, certe *li* estas vera, kvankam li ne aspektas vietname; nek flava haŭto nek aziaj frunto, orelo, lobo dekoracias lin. Jes, nun mi komencas ekscii, kiu venas el la vera Vietnamio. Ho, kia feliĉulo mi estas!"

Bedaŭrinde mian ekfeliĉigantan pripensadon nun ĝenis miaj samtablanoj, kiam ili komencis laŭvice demandi lin, por pruvi sian puran resp. veran vietnamecon. Komencis la egipto: "Kiel vi rilatas kun simioj?" - "Simioj!" triumfe venis el lia buŝo. "Mi ŝatas ilin, kompreneble ne en la lito." Nun la litovo demandis lin: "Kiaj estas viaj rilatoj al flavhaŭtuloj, kaj kion vi preferas: esti ĵetata per ĉerizkernoj aŭ per tomatoj?" Nun liaj lipoj tremetis kaj iom necerte li esprimis siajn pensojn preskaŭ flustre: "Do, flavhaŭtuloj estas homaĉoj. Koncerne al la kontraŭĵetado mir preferas ĉerizkernojn. Kvankam ili estas malmolaj, tamen ili ne efikas ruĝaĉajn makulojn, aŭ sur la ĉemizo aŭ en la vizaĝo." Senpacience la norvego insistis ekscii, ĉu li povus fari referaĵon pri piedkaloj de lia bopatro. Konfuzo pri tia impertinenteco li kapneis, dirante: "Ho, kial mi bezonu la piedkalojn de mia bopatro! Miaj propraj sufiĉas; ĵus ili premas min forte." Finfine agacante la skoto volis scii, kie li konservas sian monon. Pri tiu troa altrudiĝemo indignite, li kriis: "Tio estas egalaĉa al vi. Mi konservas ĝin tie!!" Kaj li montris al siaj sidvangoj momente ne uzataj. "Kial vi faras al mi tiaj vere malsaĝaj demandoj, kiujn eĉ ne vera vietnamo kiel ĉi tiu povas respondi!" Per sia pugno li batis kolere sur la tablon, tiel ke cindrujo tie staranta saltetis.

Nun granda ŝtono falis de sur mia animo. Malpezigitte mi povis diri: "Jen estas! Per tiu vorto, ke mia najbaro estas vera vietnamo, li pruvas sian propran malsaĝecon! Ĉar li diris al mi sidante en taksio, ke *li* venas el la vera Vietnamio. Ĉu li aspektas vietname? Kiu scias, kie li konservas sian monon! Ĉu vi kredas ke tute li estas vietnamo, ke ..." Min interrompante li elvokis: "Haltu, ĉesu! Vi horore misaŭdis. Sole mi pretendis, ke mi venas el la vera *Germanio*! Tute male ol vi sugestis min per viaj stultaĉaj demandoj!"

Kaj unu post la alia ridante enfalis pervorte: "Kie oni ŝatas simiojn, ankaŭ en la lito! Kie oni nomas flavhaŭtulojn homaĉoj! Kie oni ŝatas estis priĵetata per ĉerizkernoj. Kie oni referumas pri siaj propraj piedkaloj! Kie oni konservas monon en la pugo!"

Iom timide nia kara vietnamo alrigardis lin; kaj flustre kaj ridetante li diris: "Tiu belega, vera kaj stranga lando, de kie vi venas, estas la iama G.D.R. Ĉu mi pravas?"

Kaj honteme nia novulo devis koncedi, ke ne povas ekzisti tia ajn stulta lando, kie oni estas ĝenata per tiaj stultaĉaj demandoj, aŭ en Germanujo, aŭ ie alie en la mondo.

Nia kara vietnamo nun alportis seĝon *veran* por li, kiu ĝis nun nur sidis sur *imagata* seĝo. Sentoplene li lasis de el sia cerbo: "Ne estas bone, fidi tro al ia imagitaĵo, aŭ *vera Germanio*, aŭ *seĝo*!" Elkora aplaŭdo unuigis ĉiujn samtablanojn, aŭ el la nuna esperantista mondo, aŭ el la iama imagita vera Germanio.

Kara leganto, ĉu mi pravas, kiam mi opinias ke ekzistas nur *unu* esperantista mondo kaj *unu* Germanujo?

Gerhard Kalkhof

Nia lernvortaro (1)

Dum la Ff-a kurso por progresintoj lastatempe aperis problemoj aŭ demandoj lernantoj pri la sekvaj vortoj:

Schmuck	ornamaĵo, juveloj	ausbeuten	ekspluati (nutzen)
Muster	specimeno	wagen	aŭdaci
Frisör	frizisto	strahlen	1. radii
Muskel	muskolo		2. brili ("brillieren")
Schwung	vervo	hohl	kalva <i>kava</i>
Satzzeichen	interpunkcia signo		

Felmano Ulriko

Frankfurtaĵoj

Vizito de kubanaj Esperantistoj en Frankfurto

La 10-an de aŭgusto la Frankfurtaj esperantistoj havis kubanan gaston ĉe ilia ĉiumarda kunveno en kafejo Albatroso. Unu semajno poste venis aliaj tri kubanoj je la saman lokon, kiuj dum semajno restis ĉe Frankfurtaj esperantistoj kaj donis al la Albatrosa rondo la internaciecan etoson, kiun tiom multaj esperantistoj ja ŝatas kaj deziras. Je la 19-a de aŭgusto vespere okazis publika kunveno en la Bahai'a centro en la strato *Raimundstraße* 129, kie unu de la tri gastoj, s-ino *Maritza Gutiérrez González*, parolis pri sia lando kaj ankaŭ respondis demandojn. Ĉeestis ĉirkaŭ 30 personoj en malgranda salono, el kiuj ĉ. 20 estis esperantistoj kaj ĉ. 12 Bahai'anoj. Maricino parolis esperantlingve kaj *Bernhard Westerhoff* tradukis ambaŭdirekten por la ne Esperanton parolantaj gastoj. La prelego estis tre interesa, kaj kompreneble la ĉeestantaro estis tre sciema kaj demandis multe pli la reala vivsituationo en tiu lasta socialisma lando de la iama sovjetunie kondukita aro. La kubana gastino kaj prelegantino volonte kaj ĉarme respondis ĉiujn demandojn, ĝis iam oni decidis fini la oficialan parton kaj daŭrigi "private" por ebligi trinkadon. Ankaŭ la du viraj kubanoj, kiuj kun ŝi du tagoj antaŭe estis je la Albatrosa rondo, *Rafael Cabrera Espinosa* kaj *Jorge Luis González Santillán*, ĉeestis, kaj Jorge post la oficiala parto ludis la gitaron por la gastoj, kiuj restis pli longe. Nur mallonge antaŭ meznokto la lastaj kvar personoj, inter ili Maricino, forlasis la gastigeman ejon por enlitiĝi. Jam je la sekva tago matene, la gastoj el la por ni fora insulo devis forlasi Eŭropon per aviadilo de la Frankfurta flughaveno.

Prelego pri la klingana lingvo

La 2-an de junio dum la monata oficiala kunveno de Esperanto-Societo Frankfurto okazis prelego pri neordinara afero: la lingvo klingana, kiu estas lingvo, kiun la leksikonoj de la plej multaj legantoj verŝajne ne priparolas. Tiu lingvo estas unu de la modernaj planlingvoj, almenaŭ en la senco de ankoraŭ ne longe ekzistanta. Unuavide ĝi eble aspektas iom strange al la komencanto: Ĝi ja havas proprajn, nelatinajn literojn, nur nekonatajn vortojn, strangan, por esperantiston parte malfacilan fonetikon kaj estas parolata de - eksterteruloj! Nu jes, ne vere, sed ne temas pri lingvo, kiun la kreinto celis esti monda helplingvo. Kreis ĝin usona lingvisto, nome *Marc Okrand*, kiun televidfilmproduktanta firmao dungis por fari tion. Ili bezonis lingvon por ilia televida sciencfikcia serio *Star Trek*, en kiu la klinganoj ludas elstaran rolon. Pro tio s-ro Okrand ja provis konstrui lingvon, kiu plejeble malmulte simulu al ekzistantaj surteraj. Tamen, por lingvisto

evidentiĝas, ke la klingana gramatiko similas al la kartvela kaj la fonetiko al la araba.

Kvankam la preleganto provis produkti netedan prelegon, uzante projekcieblajn foliojn, fotojn kaj televidilon por montri klingane parolantajn klinganojn, ŝajnis, ke la temo por granda parto de la aŭskultantaro tamen estis sufiĉe malfacila kaj stranga. Fine de la longa prelego kelkaj aŭskultantoj estis aŭ mirigitaj aŭ ŝokitaj. Unu demandis: Kial oni okupiĝas pri tia stultaĵo?

Oficejaj salonoj plej multekostaj en Frankfurto ĉe Majno

Unu kvadrata metro por oficeja spaco estas en Frankfurto ĉe Majno ankorau pli multekosta kaj malpli facile disponebla ol en Berlino, Munĥeno kaj Hamburgo. Tiu evidentiĝas el studo de la maklerista firmao *Jones Lang Wootton*. Laŭ tiu la plej altaj luprezoj por oficejoj en la frankfurtmajna banka kvartalo en 1998 restis ĉe la antaŭ jaroj atingita kvadratmetra prezo de 65 germanaj markoj (gmk). La plejmultaro de la kontraktoj estas ĉe 50 gmk, prezo, kiu estas atingata en Munĥeno nur tre malofte. La frakcio de neuzata spaco pro mankantaj novaj konstruitaĵoj malaltiĝis de 8,4 al 7,7 elcento, la vendosumoj restis ĉe la antaŭa alta nivelo. Pri Berlino kaj Hamburgo la firmao konstatis por 1997 kaj la jarkomenco de 1998 pintaj prezoj de ĉ. 45 gmk je kvadrata metro, sekvata de la urbo Duseldorfo per 40 gmk. En Visbado la plej multekostaj oficejoj kostas preskaŭ 25, en Lejpcigo iom pli ol 20. Per 33,8 elcento Lejpcigo havis la plej altan frakcion de neuzata spaco. La plej malaltan frakcion de liberaj oficejoj (2,1 %) kaj samtempe la plej altan kvanton de ekzistanta oficeja spaco (14,4 milionoj da m²) la makleristoj konstatis en Munĥeno, sekvata de Berlino (13,8 mil. da m²).

El: *Süddeutsche Zeitung* de 1998-4-16, p. 25.

Novaj lingvokursoj

Komence de novembro denove komenciĝis du kursoj de diversaj niveloj por la lingvo Esperanto. Unu estas kurso por komencantoj, kiun gvidas s-ro Bajro, momente kun nur du partoprenantoj. Oni tie akceptos aldonajn interesiĝantojn pri la internacia lingvo. La alia kurso estas por progresintoj sur sufiĉe alta nivelo. Oni tie uzas la libron de William Auld, *Paŝoj al plena posedo*, kaj preparas sin por la supera ekzameno. Partoprenas momente regule sep personoj. Ambaŭ kursoj okazas mardovespere en la universitato de Frankfurto ĉe Majno en la konstruaĵo „Neue Mensa“ en la salonoj

109 (komencantoj) kaj 110 (progresintoj), la unua komenciĝanta je la 18-a horo, la dua je la 18-a kaj 45 minutoj.

Felmano Ulriko

SERVAS

„Mit jeder aufrichtigen Freundschaft festigen wir die Fundamente des Weltfriedens.“

Dieser Ausspruch Mahatma Gandhis drückt die Grundidee der internationalen Friedensorganisation SERVAS aus: Auf Basis individueller Begegnungen will SERVAS zum besseren Verständnis unter den Völkern der Erde beitragen, zu Frieden, Toleranz und sozialer Gerechtigkeit. Im internationalen SERVAS-Netzwerk öffnen Gastgeber daher ihre Türen für Reisende, um so die Möglichkeit zum Brückenschlag unabhängig von Herkunft, Gesinnung, Hautfarbe oder Glauben zu bieten. 1948 von dänischen Studenten als „Open Doors System of Work, Study and Travel“ gegründet, bringt die spätere Umbenennung in SERVAS (nach dem Esperanto-Wort für „du dienst“) den Gedanken des Dienstes an einer Völkerverständigung zum Ausdruck. SERVAS International als Zusammenschluß von ca. 100 Ländergruppen wirkt als NGO durch ständige Vertreter in New York, Genf und Wien bei den Vereinten Nationen mit. Voraussetzungen für eine Mitgliedschaft sind ein Mindestalter von 18 Jahren und Toleranz für die Vielfalt von Menschen und Lebensgewohnheiten auf dieser Erde. Potentielle Reisende

SERVAS-o

„Per ĉiu sincera amikeco ni firmigas la fundamentojn de la monda paco.“

Tiu ĉi eldiro de Mahatmo Gandho esprimas la principon de la internacia paca organizaĵo SERVAS: Pere de individuaj renkontoj, Servas volas kontribui al pli bona kompreno inter la nacioj, al paco, toleremo kaj socia justeco.

En la internacia SERVAS-teksaĵo, gastigantoj malfermas siajn pordojn por vojaĝantoj por tiel prezenti la eblon por konstrui pontojn sendepende de deveno, ideologio, haŭtkoloro aŭ religio.

Servas estis fondata je 1948 de danaj studentoj je la nomo de "Open Doors System of Work, Study and Travel" [Sistemo de malfermitaj pordoj por laboro, studado kaj vojaĝado]. Poste ĝi estis renomata SERVAS (laŭ la Esperanto-vorto) por esprimi la ideon de la servado por la kompreno inter la nacioj.

SERVAS International (Servas-o Internacia) estas unuiĝo de ĉirkaŭ 100 ŝtataj grupoj kaj kunagas kiel NRO [neregistrara organizaĵo] ĉe la Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko, Ĝenevo kaj Vieno.

La kondiĉoj por rajti membriĝi estas aĝo de minimume 18 jaroj kaj toleremo rilate al la diverseco de la homoj kaj vivmanieroj en la mondo. Eventualaj vojaĝantoj kaj/aŭ gasti-

oder/und Gastgeber führen zunächst ein persönliches Gespräch mit lokalen Vertretern von SERVAS, in dem die Geschichte und Motive von SERVAS erklärt sowie grundlegende Regeln besprochen werden. Mit der Ausstellung eines beglaubigten Schreibens bzw. der Aufnahme in das jeweilige Gastgeberverzeichnis werden die Interessenten dann als Mitglieder der weltweiten Gemeinschaft ausgewiesen. Die jährlich aktualisierten Länderlisten sind der Schlüssel für die Begegnungen, deren Zustandekommen und Verlauf jedoch allein von den Abmachungen der Beteiligten abhängt. Üblich ist dabei ein Aufenthalt von je zwei Tagen (oder Begegnungen mit Tagesgastgebern ohne Übernachtungsmöglichkeit).

gantoj komence estas intervjuataj de lokaj reprezentantoj dum kiu la historio kaj la motivoj de Servas estas klarigataj kaj bazaj reguloj estas diskutataj.

Pere de konfirmita dokumento respektive la akcepto en la respektivan liston de gastigantoj, la intereso estas legitimataj kiel anoj de la tutmonda komunumo.

La ĉiujare aktualigataj listoj estas la rimedo por la renkontoj, kies realigo tamen dependas sole de la interkonsentoj de la partoprenantoj.

Kutimaj estas restadoj de po du tagoj (aŭ renkontoj kun tagogastigantoj sen eblo por tranokti).

Kontaktadreso: Dennis Wibrow, Heidestraße 9, 60316 Frankfurt, Tel. 069/499767

Dennis Wibrow

Nia lernvortaro (2)

Ĉi-jare en kafejo Albatroso iu miksis la vortojn pastro kaj pastoro. Same kiel pri la vortkampo de preĝejo en Esperanto ekzistas diversaj vortoj por la pastroj de la diversaj religioj. Jen kiel estas:

ĝenerala:	pastro	preĝejo
kristana:	-	kirko
katolika:	sacerdoto	-
evangelia:	pastoro	-
ortodoksa:	popo	-
islama:	imamo	moskeo
juda:	rabeno	sinagogo
alia:	-	templo

La esprimo islama estas moderna vorto, antaŭe oni uzis muzulmana aŭ mahometana. Por la aliaj religioj certe ekzistas apartaj vortoj por la pastro, sed ŝajne ne jam certaj vortoj en PIV (aŭ mi ne trovis ilin).

Felmano Ulriko

Ĝustigo pri la Esperanto-historio de Frankfurto

La rubriko „70-aj jaroj“ (*MALBABELO* 11½/1998, paĝo 52) entenas kelkajn erarojn. La fervojistaj esperantistoj kunvenis regule ne en Frankfurt-Nied, sed en fervojaj oficejoj ĉirkaŭ respektive en la centra stacidomo de Frankfurt. Vidu la artikolon „Fervojistoj kaj Esperanto en Frankfurt“ (*MALBABELO* n-ro 5/1996, paĝoj 10/11). Iliaj regulaj kunvenoj ne ĉesis en la 70-aj jaroj, sed fine de 1991, kiam la fervojo ne plu volis disponigi apartan ĉambron ekster deĵoraj tempoj. Krome la transloĝiĝo de la Esperanto-Societo Frankfurt al la domo *Dornbusch* efektiviĝis jam en la 60-aj jaroj, kiam la tiama prezidanto *Kistenbrügger* faris kontrakton kun la urba kompanio *Saalbau*.

Wilhelm Barnickel

Rimarkigo de la redaktisto: Mi ĉiam estas dankema pri tiaj korektoj. Estas ja malfacile por persono, kiu mem ne spertis la aferon en la praktiko, skribi pri iu pasinta afero korekte, precipe, se mankas la dokumentoj kaj se la plej multaj iamaj agantoj rifuzas skribi pri la afero. S-ro Barnickel estas - krom mi mem - preskaŭ la sola, kiu iam ajn skribis pri historiaj aferoj en Frankfurto. La saman problemon mi spertis rilate al la esploro de la historio de RoMoLo. Ĉiu, kiun mi demandis pri tio, rifuzis skribi pri la afero. Mi persone ne havas la spertojn, mi venis al Frankfurto maljam en 1990 kaj membriĝis al la klubo eĉ pli poste. Kion fari?

Mi do foje demandas la „spertulojn“ rakonti al mi pri la okazintaĵoj el la pratempo, kion ili volonte faras, sed oni nur raportas pri tio, kiun mi demandas. Mi aldone legis kaj legas malnovajn gazetojn kaj trafoliumas „antikvajn“ aktojn por malkovri la estintecajn agadojn kaj faktojn.

Tiel ankaŭ pri la transloĝiĝo de la Esperanto-Societo Frankfurta al la domo *Dornbusch*, kio - laŭ nia vizitlibro, kie ĉiuj kunvenoj de la klubo ekde la 50-aj jaroj estas dokumentitaj kun dato kaj loko - ne efektiviĝis jam en la 60-aj jaroj. Mi ne povas imagi, ke oni tiam daŭre erare notis malĝustan lokon, do mi supozas, ke almenaŭ en tiu punkto miaj informoj estis ĝustaj. Sed eble alia multjara membro povas heligi tiun aferon.

Lingvaj problemoj

Eurodicautom helpas pri EK-lingvaj fakterminoj

Fremdlingva prelego povas facile iĝi abstrusa se mankas la bezonata fakvortaro. En tia okazo povas helpi la terminologia datumbanko *Eurodicautom*. Ĝi liveras la necesan vortaron pri la diversaj fakaj areoj. 4,5 milionoj da fakaj terminoj verŝajne prezentos iun interesan por ĉiu. TTT-a adreso: www2.echo.lu/edic/

El: **Die Zeit** de 1998-4-23, p. 77.

Francoj demonstracias por regionaj lingvoj

Kelkaj miloj da francoj dum la semajnfino demonstraciis por la sekurigo de sia bretona, elsasa (alzaca) kaj eŭska (vaska) lingvoj. Laŭ informoj de la organizantoj estis ĉirkaŭ 10.000 da homoj, kiuj partoprenis la demonstraciojn en la urboj Reneo, Strasburgo kaj Bajono. Ili postulis la ŝanĝon de la artikolo dua de la franca konstitucio, kiu fiksas la francan lingvon kiel solan ŝtatan lingvon. Per la konstitucio ankaŭ la regionaj lingvoj estu protektotaj. Aldone, la demonstraciantoj postulis de la franca registaro efektivigi la Eŭropunian ĉarton pri lingvoj. Ekz-e la elsasa estas parolata de 1,6 milionoj da loĝantoj de la du departementoj ĉe la rivero Rejno.

El: *Süddeutsche Zeitung* de 1998-4-6, p. 7.

Tro multe kaj tro rapide: Pri la (ne nur lingvaj) sekvoj de la aktuala kunfandado de grandaj usonaj kaj germanaj firmaoj

Sub la titolo „Kunfanda febro: Konzernoj sen hejmlando“ oni en la enhavindiko de la aktuala kajero de la revuo „Der Spiegel“ anoncas artikolon pri la kunfando de grandaj germanaj kaj negermanaj firmaoj per teksteto, kiu finas per la frazo: „Antaŭ ĉio doloras unu afero: En la kunmetitaj firmaoj la germana lingvo pli kaj pli malaperas.“

En la artikolo mem, kiu titolas „Tro multe kaj tro rapide“, oni povas i.a. legi la jenan:

„[...] En la pasintaj jaroj la situacio de la dungitoj de la firmao Hoechst estis draste ŝanĝiĝanta: la tradiciaj strukturoj estis detruataj, la komercadon de farmaciaĵoj oni kunfandigis kun la usona konzerno Marion Merrell Dow kaj la franca konzerno Roussel Uclaf. Ekde tiam, la tuta entreprenularo parolaĉas en grandioza lingvaĉo. Se ĉeestas nur unu usonano, ĉiuj aliaj dungitoj parolas la anglan, se eĉ ili tiun oficialan firmaan lingvon nur malbone regas. La estrarino de la pensia kaso, Petra Zamagna, raportas: «Firmainternan mesaĝon, kiu estas en la germana, la estroj preskaŭ

jam taksas esti provoko, aŭ ili la enhavon ne traktas serioze.» [...] La honora s-ro profesoro, kiu dum jaroj sendepende esploris ĉe sia laboratoria tablo, hodiaŭ estas salutata per la vortoj «hey Joe» [hej ĝoŭ], almenaŭ, se proksime troviĝas usonano. Se germanoj sole renkontas lin, ili evitas tiajn alparolojn. [...] La esplora sekcio en Frankfurto, antaŭe kvazaŭ speco de Ĥemia Olimpo, klare perdis estimon kaj signifon. [...] «Hire and fire» (dungu kaj maldungu) nomiĝas la el Usono importita principo.“

El: **Der Spiegel** 49/1998, p. 98.

Tempa mozaiko: Thomas Kapielski

Sed uzu nuntempe la trajnon. Fiaĉe! Ĝi ne plu rajtas nomiĝi „Eilzug“ (kuranta trajno), devas nomiĝi „InterRegio“! Kun kremkolora vortomeza majusklo. Post tri jaroj oni denove ŝanĝos tion. [...] Ili ne plu akceptas, ke la inĝenieroj konstruas kaj nomas la trajnon, kiel estis bone kaj bele. Nun el „Schienenbus“ (rela buso) iuj „Designer“ devas misformi „RegioShuttle“. Pesto! Ĉio ŝanĝiĝas, ne, ĉar ĝi eksmodiĝas, sed ĝi eksmodiĝas, ĉar ĉio daŭre devas esti ŝanĝata. Ankaŭ en la lingvo ĝenerale: „Outplacement“ kaj „All-includes-Reisen“.

El: **Die Zeit** de 1998-11-26, p. 2.

Utila prilingva eraro, aŭ: PER ANGLICA AD ASTRA*

Pli ol duonmilion-foje muzikdisko vendiĝis, kaj ekde monatoj ĉiuj radiostacioj sendas "Rescue mi" [angle: savu min], la platinan hiton de la muzikbando *Bell, Book & Candle* [angle: sonorilo, libro kaj kandelo]. Nun la sukcesa bando estas je vojaĝo tra Germanujo, kaj la bandanoj kaj fanatikuloj, kiuj atendis britan grupon, devas ŝanĝi sian opinion, ĉar *Jana*, la kantistino, inter la kantoj berlingermane babiladas, ekz-e "Det is wirklich ganz doll, bei euch zu sein" [vere bonegas esti ĉe vi]. Estas tiel, ke la grupon konsistigas la orient-Berlinanoj *Andy Birr*, 29, *Hendrik Röder*, 31, kaj *Jana Groß*, 28. Jam en la iama ŝtato GDR *Birr* kaj *Röder* sukcesis famiĝi pere de rokbando. En la socialismaj "gefrataj" landoj ili tamen ne estis akceptataj. Ili tiam lernis: "Oni nur sukcesegas, se oni kantas anglalingve." Pro tio la grupo *Bell, Book & Candle* eĉ dungis anglan ko-kantaoŭtoron.

El: **Der Spiegel** 1/1998, p. 83.

*) : Latina frazo laŭ la konata romia slogano "PER ASPERA AD ASTRA" = per laborego al sukcesego (laŭvorte: al la steloj). En la supra nova versio la vorto "angla" anstataŭas la vorton "laborego".


Felmano Ulriko

Kiel trovi Zamenhofejon en Frankfurto: La Ŝtona Domo.

En la jaro 1907 Zamenhofo ripozis en la banloko *Bad Nauheim*, nur 20 kilometrojn norde de Frankfurto ĉe Majno. Dum tiu tempo li la duan fojon vizitis la esperantistaron en Frankfurto kaj faris dum la 15a de septembro publikan, germanlingvan paroladon de la balkono de la gastejo (kaj tiama E-kunvenejo?) *Steinernes Haus* ("Ŝtona Domo").

Pri tiu raportis gazeta artikolo, kiu troviĝas en la klublibro de ESF. La "Ŝtona" Domo, strato Braubachstraße 35, feliĉe restis ĝis hodiaŭ kaj estas ankoraŭ gastejo, kie indas manĝi. Kiel gasto vi povas poste diri: Mi manĝis en la sama gastejo kiel Zamenhofo!

Aliflanke samstrate situas la unua kunvenejo de la Ff-aj esperantistoj post la dua mondmilito la urba ofico pri publika sano (Stadtgesundheitsamt). Legu la noton en MALBABELO 8-a.



Le mal **babela**

Frankfurtano

...havas daŭre la sekvajn eblojn kontakti Esperantujon:

★
Ĉiun unuan kaj trian ĵaudon monate la Frankfurta E-Societo kunvenas en la publika domo *Haus Dornbusch* en la strato *Eschersheimer Landstraße 248* teretaĝe. La lingva rondo komenciĝas je la 18-a kaj duono, la prelego je la 19-a kaj kvarono. Publikaj trafikiloj: subteraj fervojlinioj

U1 U2 U3 haltejo **Dornbusch**

ⓓ

Jeden monatersten und monatsdritten Donnerstag trifft sich die Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main e.V. um 18.30 Uhr im Haus Dornbusch, Eschersheimer Landstraße 248. An den monatersten Donnerstagen beginnt die Sprachrunde um 18.30 Uhr, der Hauptvortrag um 19:15 Uhr. Gäste und Interessenten sind jederzeit willkommen! Anreise im ÖPNV: U1, U2 und U3 (nur 2 min. Fußweg ab Haltestelle Dornbusch).

★
Ĉiun mardon kunvenas la lerna kaj babilada grupo en la kafejo *Albatros* en la strato *Kiesstraße 27* apud la universitata areo je la oka horo vespere. Publikaj trafikiloj: subteraj fervojlinioj U6, U7. Tramo 16. S-linio 6.

U6 U7 16 **Bockenheimer Warte** **S6** **Westbahnhof**

Jeden Dienstag trifft sich die Schwätz-, Lern- und Babel-Gruppe im Café Albatros, hinterer Raum, in der Kiesstraße 27 (in unmittelbarer Uninähe) ab etwa 19.30 Uhr. Anreise im ÖPNV s. oben (jeweils noch 5 min. Fußweg).

ⓓ

Sprachkurse finden etwa zweimal im Jahr statt und werden je nach Bedarf durchgeführt. Veranstaltungsort ist meist die Universität. Einfach ins Café Albatros kommen und fragen!

世 界 语 **Эсперанто**